

NIA VOĈO
Madrída Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4^oB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

MAJO 2003

EMILIO HERRERA

Antaŭ kelkaj monatoj mi jam informis vin pri artikoloj kiun mi verkis en "Aerogaceta", oficiala bulteno de la Fondaĵo Emilio Herrera. Ili petis pliajn. Ĝus aperis numero 10a de la revuo, kaj en ĝi aperas en elstara loko du paĝoj rilate nian lingvon. Longa artikolo "Un idioma verdaderamente internacional en la Navegación aérea: el esperanto", en kiu mi informas pri la avantaĝoj kiujn havus la elekto de tiu ĉi lingvo kompare al la nuna elekto, la angla. Mi uzas kelkajn el la argumentoj uzitaj plurloke de niaj samideanoj Kent Jones kaj Gilbert Ledon, kaj ankaŭ mi profitas ke Herrera mem verkis ĉirilatan artikolon en la 20aj jaroj. Ankaŭ aperas du kromaj pli malgrandaj eroj:

- informo pri la aperigo de novaĵoj rilate nian antikvan samideanon Herrera en la esperantista gazetaro (interalie en Boletín)
 - transskribo de la malneto de letero aŭtografa de Herrera en esperanto, kiu aperis en la arĥivo de la Fondaĵo, kun traduko en la hispanan (tiun ĉi mi publikigis ankaŭ en mia retpaĝo)
- La rezulto (laŭforme, kaj mi esperas ke ankaŭ ĥuĕnhave) estas tre kontentiga; oni inkludis ankaŭ foton de Zamenhof, esperantan flagon, bildon de stampo en esperanto kaj bildon kun la menciita letero, kaj la tuto estas sufiĉe alloga. (Tonyo)

NACIA BIBLIOTEKO

En la ĝenerala katalogo de la hispana Nacia Biblioteko, kiam oni konsultas per la vorto "esperanto", aperas jena rezulto: www.bne.es/esp/cat-fra.htm

105	modernaj libroj ekde 1831
14	revuoj kaj ĵurnaloj
2	Gravuraĵoj, desegnoj kaj fotografiaĵoj
1	Partituroj
6	Sonaj surbendigoj

En la katalogo de hispanaj bibliotekoj, en la sama ret-paĝo, aperas datumoj pri la "Biblioteko Juan Régulo" de HEF kaj la biblioteko de la Valencia Grupo.

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3^o-7 Tel. 91 446 80 79.

Prelegoj: 16-a de junio. 19,00h. "Rol-ludoj". Juan del Castillo

PASKA BENO

Kiel kutime ekde 1994 la Papo Johano Paŭlo la dua donis sian paskan benon en pli ol sesdek lingvoj, inter ili en Esperanto. Kelkaj esperantistoj gvidataj de Gianni Conti, el Milano, fizike ĉeestis sur la Placo de Sankto Petro en Romo: vidu fotojn ĉe www.ikue.org

DIVERSAJ

La plej gravajn artikolojn de la prestiĝa franca ĵurnalo "Le Monde Diplomatique" oni povas legi esperantlingve ĉe la reto: <http://membres.lycos.fr/vilhelmo/lemondediplomatique.htm>

La 13-an de marto aperis en la lasta paĝo de la hispana ĵurnalo "El Mundo" anonco pri esperanto. Japana esperantisto donis 1.000 eŭrojn al diversaj landaj asocioj kun tiu celo. Dum la pasintaj monatoj aperis tutpaĝa anonco en "European Voice", anglalingva gazeto multe legata de politikistoj kaj ĵurnalistoj en Bruselo kaj en "Politiken", dana gazeto kaj en belga metrogazeto (disdonita senpage) .

KURSO EN MADRIDO (Juan del Castillo)

Plaĉas al mi instrui Esperanton. Precipe al tiuj, kiuj neniam eĉ malfermis esperantmetodon. Mi ja envas tiujn ĉi. Ili memorigas al mi tiun momenton, kiam unuafoje mi gavis pro ĝia logika kaj regula strukturo, kiam mi eklernis krei vortojn anstataŭ tede enkapigi ilin. Tiam mi pensis, mi ankoraŭ memoras, ke io tiel studinda, nepre sukcesos. Nu, jaroj pasis, kaj mi plu pensas la samon. Sed mia kapablo miri pri ĝi preskaŭ malaperis; tiom ĉi tiu lingvo hejmiĝis en mi! Eble tial mi serĉas fojon post fojo naivecon tiaman en la okuloj de miaj gelernantoj. Same kiel nun, ĉe kurso tuj finiĝonta.

Ili estas dek kvar (el dek kvin... esperiga sukceso!). Homoj diversaĝaj, devenantaj el kvar landoj. Fortune ĉiuj scipovas la hispanan, ĉar la metodo de Adúriz estas uzata. Longa tablo, meze de sufiĉe granda klasĉambro kie ne mankas taŭga skribtabulo, kunigis nin ĉirkaŭ ĝi laŭlonge tri monatoj. Tiu ejo, ŝajne neniel eksterordinara, posedas specialan signifon: ĝi situas en la firmao pri telekomunikado "Sinatel", de Juan Abad, kiu malavare havigis ĝin al ni por instrui. Fakte duono el la kurso-ĉeestantoj laboras en tiu entrepreno. Jes, vi eksuspektas korekte!...: Firmaestro pagis la E-kurson celante uzi la internacian lingvon por eksterlandaj negocaferoj! Ĉu ne paradizo por E-instruistoj?

Dum entute 24 horoj klasaj ili estis survestantaj sin per radikoj, afiksoj kaj akuzativoj. Ili ŝmiris sian haŭton per la ĉiopovaj participoj. La tabelvortoj alloge ŝminkis ilian nekaŝeblan aspekton de komencantoj. Sed, ĉu io enŝoviĝos enen aŭ ĉio restos supraĝe? Kiel instruanto povas amigiton studatan? Kiamaniere enkapigi, pli bone, enkorigi al ili la konvenon pluen paŝi por vere ekvidi la lingvan miraklon? "Iru transen, malantaŭ la nevideblan linion, kiu disigas nuran lingvon kaj pliaĵon. Paŝu pluen kaj Esperanto akompanos vin la tutan vivon!" – mi diras. Ĉu senutila peno konvinki per ideoj pragmatikulon?. Alifoje la samaj ĉefinaj demandoj... Denove nova vana plano aranĝi postkursan amuzan agadon por konstruistari ilian forkuremon...

Eble vi konstatas ian senesperan nuancon ĉe mia surpapera voĉo. Ne miskomprenu. Mi ne kapitulacos!

VENONTAJ KONGRESOJ

55-a IFEF Kongreso. 10-16 majo. Dresden (Germanio)

Kongreso de "L'esperanto en France". 29 majo - 1 junio. Gresillon (Francio)

62-a Hispana Esperanto-Kongreso. 15 - 20 Julio. Valencia.

76-a SAT Kongreso. 12-19 julio. Le Chaux-de-Fonds (Svisio)

88-a UK. 26 julio - 2 aŭgusto. Göteborg (Svedio).

NOVA ESPERANTA RETREVUO

Temas pri retrevuo "Libera Folio". Tie estas troveblaj interesaj intervjuoj rilate al la lastatempaj pluraj demisioj ce UEA. La retadreso estas: <http://folio.xrs.net> aŭ <http://www.algonet.se/~kallekn/folio/>

.....

ESPERANTO LICEO DE MADRID

San Alejandro 6-4^B. Ext

28005 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal